

Enketo de la ŝtato Neuchâtel pri la bezonoj de la junularo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 533, 1973.12.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Oni multe parolas pri la junularo. Sed ĉu ĉio, kion oni asertas pri ĝi estas objektiva kaj pruvita? Tre verŝajne ne. Multaj tendencas idealigi la junularon, metante en ĝin sian esperon je hom-progreso. Aliaj kontraŭe vidas en la junuloj nur drogemulojn, perfortemulojn, profitemulojn.

A.- La 25-an de februaro 1964 la deputito advokato Jules Biétry prezentis en la Parlamento de la kanto Neuchâtel tre interesan proponon rilate al la bezonoj de la junularo. En lia argumentado, kiun li prononis kvar jarojn poste, tio estas en 1968, advokato Biétry sin demandis, ĉu oni alportas sufiĉe da atento al la viv-bezonoj de la junularo. Li konstatis iujn fundamentajn mankojn rilate al la socia vivo junulara kaj li proponis la kreon de sekretario por la junularo kaj la sportoj. Konklude al sia propono advokato Biétry instigis la plenumajn aŭtoritatojn de la kanto Neuchâtel fari inventaron de la nunaj bezonoj de la junularo.

Cl.- La Registaro de la kanto Neuchâtel akceptis fari tiun inventaron. Tuj formiĝis laborgrupo kun delegitoj el plej diversaj instancoj kaj medioj. Estis reprezentataj en tiu laborgrupo la socia oficejo *Office social neuchâtelois* ; pedagoga organizaĵo, kiu formas junulgvidantojn : *Centre d'entraînement aux méthodes d'éducation active* kaj la protestanta socia centro : *Centre social protestant*. Dank'al la ĉeesto en tiu laborgrupo de reprezentantoj el gravaj sociaj organizaĵoj la laboro estis sufiĉe efika.

A.- Post unu jaro, tio estas en julio 1969, tiu laborgrupo havis aŭdiencon kun la neŭŝatela ministro de la publika instruado, sinjoro François Jeanneret, kaj la Departemento de la Publika Instruado de la kanto Neuchâtel akceptis liberigi instruiston, por lin meti je la dispo de la koncema laborgrupo en la celo entrepreni enketon pri la nunaj bezonoj de la junularo, tio sub la respondeco de la protestanta socia centro. Kreiĝis granda komitato kun 42 membroj. En ĝi estis reprezentataj la diversaj politikaj partioj kaj plej diversaj publikaj kaj privataj organizaĵoj, inter kiuj ni menciuj la kurac-pedagogian servon, la oficon por la neplenaĝuloj, la policon, la ĵus kreitan oficon 'junularo kaj sporto,' la oficon de la metilemantoj, la ekleziojn, la asocion 'lernejo de la gepatroj', pedagogiajn asociojn, junularajn movadojn, kaj tiel plu. Advokato Biétry, la proponinto de tiu enketo, estis alvokita al la prezido de tiu komitato.

Cl.- Paralele formiĝis labor-komisiono, kiu kunsidis kun kvindek da gejunuloj. Ĝia tasko estis la formulado de demandoj, kiuj permesu koni la vidpunktojn de la nuna junularo, tio koncerne la temojn laboro, geedziĝo, sekseco, familio, lernejo, metiformado, drogo, politiko, religio, armeo.

A.- Tiam estis la jaro 1970. La gazetaro, la radio kaj la televido ankoraŭ reeĥis la eventojn de majo 1968, kiuj restis en ĉies memoroj.

Cl.- La listo de la rikoltitaj demandoj estis poste submetita al sociologo kaj statistikisto, kies tasko estis garantii al la efektivigota enketo ties scienca valoron. La ricevotaj respondoj havu signifon, kiun oni povu poste komputere analizi. Provizora demandaro estis submetita al proggrupo de gejunuloj. Kaj kiam la fakuloj ricevis la impreson esti alvenintaj al taŭga

demandaro, ili submetis la tutan enketilon al la aprobo de la granda komitato kaj fine al la Registaro de la kantono Neuchâtel.

A.- Jen rapida priskribo de tiu enketilo. En la unua ĉapitro oni informiĝis pri la persona situacio de la demandito : aĝo, civila stato, loĝkondiĉoj, nacieco, hejma lingvo. La nomoj, familia deveno kaj adreso ne estas petitaj por garantii la anonimecon de la enketo kaj tiel favori la verecon de la respondoj.

Cl.- La dua ĉapitro informiĝas pri la laboro kaj la studoj.

A.- La tria ĉapitro pri la familio kaj la amikaro.

Cl.- La kvara ĉapitro pri hobiaĵoj kaj kulturo.

A.- La kvina ĉapitro estas titolita *Dio, la societo, la politiko*.

Cl.- La sesa ĉapitro interesiĝas pri la geedziĝo, la seksa vivo, la infanoj.

A.- Estis aldonitaj kelkaj demandoj pri la natur-malpurigo kaj naturprotektado.

Cl.- Sume estis 135 demandoj, kiuj estis proponitaj en 1971 al la pripenso de pli ol 1'000 gejunuloj, kies aĝo estas inter 16 kaj 20 jaroj. Tiu enketo tuŝis 7 procentojn de la tuta junularo de la kantono Neuchâtel. La demanditoj respegulas la ĝeneralan situacion de tiu junularo. El tio la valoro de la enketo.

A.- La venontan semajnon, sur la bazo de tiu enketo, ni montros al vi, kion la hodiaŭa junularo de la kantono Neuchâtel opinias pri la familio kaj amikaro.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!